

Kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu
de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj, 9-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 654, 1976.04.21 & 24

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesignoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Se oni volas, ke progresu la peresperanta instruado de la naciaj lingvoj, materialo favora al tiu ĉi instruado devas esti kreita. Ekzemple kiel instrui la peresperantan verkadon en la naciaj lingvoj, se ne ekzistas speco de antologio de tradukotaj tekstoj ?

A.- Jen hodiaŭ ni prezentos kelkajn tekstojn de Edmond Privat, kiuj povus eniri tian antologieton de simplaj verketoj, kiuj formas tuton en si mem kaj bone respegulas la stilon de la aŭtoro. Preparaj ekzercoj devus pretigi la gelernantojn al la traduko de tiuj ĉi rakontoj, poemoj kaj priskriboj.

Cl.- La tuta novelo **Tamen perdota** estus alirebla por traduko al geknaboj. El ĝi ni citas nur la komencon, kiu alportas mediteranean etoson :

A.- « Odoras akre brulo pina. La vento blovas ian fumon. Jam kaŝas sunon kruda nubo en okcidento. Malsupre, tre malsupre, la maro lekas rokon, mordas, ŝaŭmas, frapas en granda pafo, rezignas, eksilentas kaj revenas kun nova bato kaj ŝprucado.

Cl.- La longaj kruroj de l' dronanta montaro etendiĝas al la oriento kaj malaperas en la maron. Genuoj rokaj, ĝibaj dorsoj elakviĝas inter ondoj. Dormantaj krokodiloj. Gigantaj monstroj.

A.- El bordo alpaŝas la ombro vespera, ekkovras ĉiam pli da maro, atakas tiun vastan bluan de la brilanta senfinaĵo.

Cl.- Trans montaro sude, la suno radias ankoraŭ sur unu golfon en hela lumo. Pejzaĝo en kadro. Miniaturo kolora. Velboatoj rapidas. Fiŝkaptistoj venas hejmen. El malproksimo vaporŝipo, eta, pli granda, jam observebla, rektlinie celas al haveno.

A.- La monta flanko estas ruĝa, nuda, ŝtonara ; sur la deklivo : pikaj arbetoj ie kaj alie, ne pli altaj ol herbaĉo. Elstaras ruinaĵo. Ronda muro. Kvarona turo kun vundo larĝe trua. Haltas la vojeto.

Cl.- Abismo danĝeras tie. Malsupre en profundo trankvilas dezerta golfeto, ne atingebla el tero. Angulo sabla. Vera kaŝejo kun muregoj altaj kiel katedraloj. »

A.- Alian etoson vekas la poemo **Dolĉa nokto el Tra l' silento**.

Cl.- Dolĉa nokto trankviligis
Kampojn, urbojn kaj ĝardenojn,
Kaj en dormo silentigis
Homajn ridojn kaj ĉagrenojn.

Homojn lulas la gitaro
De la sonĝa forgesado.
En herbejo de l' kamparo
Dormas grilo kaj cikado.

Sur la lagon ĵetas brilon
Kvaronluno en ĉielo
Kaj blugas la profilon
De malnova la kastelo.

Dum horloĝoj en la domoj
Tra l' silento tik-takadas,
Pri feinoj kaj pri gnomoj
Dormuletoj nun songadas.

A.- Kaj la teksto **Ĝenevo**, kiun ni ĉerpas el **Aventuroj de Pioniro**, ĉu ne tradukinda, almenaŭ por la junaj ĝenevanoj kaj svisoj :

Cl.- « En Usono kiel knabo (inter gimnazio kaj universitato) mi lernis unue sendependecon : fiere gajni sian propran vivon kaj ne skribi hejmen por peti monon ; due kontinentan modestecon : ne konsideri Eŭropon kiel tutmondon ; trie nacian modestecon : eĉ ankoraŭ pli, ĉar multaj usonanoj eĉ nesciis precize, kie kuŝas nia malgranda lando. Ili tute nesciis, kian lingvon oni parolas ĉe ni, kaj ofte petis min, en vespermanĝoj, diri kelkajn vortojn en la « svisa lingvo ».

A.- Unu ĵurnalisto, kiu min abunde fotografis en ĉiuj eblaj sintenoj, stare, side ktp, poste komencis sian artikolon jene : « La juna apostolo de la mondlingvo naskiĝis antaŭ dekok jaroj en Ĝenevo, malgranda vilaĝo sur la neĝkovritaj montoj de Svislando. » Alia, en Ohio aŭ Indiana, demandis min, en kiu urbo mi naskiĝis.

Cl.- « En Ĝenevo », mi diris.

A.- « Nu », demandis li, « Ĉu Ĝenevo en la Ŝtato Nov-Jorko aŭ Ĝenevo en Illinois ? »

Cl.- « Ne », mi respondis, « Ĝenevo en Eŭropo ».

A.- « Nu ! », li ekkriis, « ĉu ekzistas unu Ĝenevo ankaŭ en Eŭropo ? »

Cl.- De tiam mi ĉiam ridas, kiam mi legas en la ĝenevaj gazetoj artikolojn aŭ urbestrajn paroladojn, kiuj favoras iluziojn pri la tutmonda gloro aŭ graveco de la patrujo de Jean-Jacques Rousseau. Estis bonega instruado por mi. »

A.- Similaj tekstoj kun la necesaj enkondukaj ekzercoj povus formi minejon da legaĵoj, kiuj avantaĝe anstataŭus lernolibrajn cerbumaĵojn. Ilin studinte kaj tradukante la geknaboj intimiĝus kun esperanto kaj ankaŭ kun sia nacia lingvo. Kiam simila antologieto ekzistos, peresperanta instruado povos komenciĝi. Antaŭe nur malfacile.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!